

# O BRASIL ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública  
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 25-26 (807-808)

Janeiro-Fevereiro 1940

Redator responsavel:  
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:  
Praça da República, 54.  
Rio-de-Janeiro, Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.  
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15  
respondekupoj.

## DEPARTAMENTO DE IMPRENSA E PROPAGANDA

Lia Moŝto D-ro Getulio Vargas, prezidanto de la Respubliko, per Dekreto-leĝo n. 5077, de la 20-a de Decembro lasta, kreis la *Departementon de Gazetaro kaj Propagando*, por anstataŭi la *Departementon de Propagando kaj Kultura Disvastiĝo*.

La nova Departemento konsistas el kvin Diviziojn, nome: de Dissciigo, de Radidisvastiĝo, de Kinematografarto kaj Teatro, de Turismo kaj de Gazetaro.

Kiel direktoro de la nova Departemento estis nomita D-ro Lourival Fontes, kiu tre efike direktis la malnovan Departementon.

D-ro Lourival Fontes, kies portreto ilustras nian artikolon, diversfoje elmontris sian simpatian al la internacia helplingvo Esperanto.

Kiam Ĝenerala Direktoro de Turismo de la Federacia Distrikto, ofico, kiun li antaŭe okupis, tiel li parolis okaze de la 36a kunveno de la Konsilantaro de la Specimena Foiro de Rio-de-Janeiro:

"Ĉeestas nian kunvenon S-ro Alberto Couto Fernandes, reprezentanto de Brazila Ligo Esperantista. Mi deziras atentigi ĉiujn, kiuj faras propagandon de Brazilo, ĉu kun turisma celo, ĉu laŭ aliaj aspektoj, por ke ili neniam forgesu ĝin fari en Esperanto. Rilate tion mi povas atesti pri ĝiaj rezultantaj profitoj.

Okaze de la turisma ekspozicio mi faris ĝian disvastigon en diversaj lingvoj, inkluzive en Esperanto. Ni ricevadas, meznombro, 15 aŭ 20 leterojn, ĉiutage, venintajn de la plej malproksimaj landoj el ĉiuj partoj de la mondo, per kiu oni sciigas, ke oni legis en Esperanto la notojn aperintajn en la ĵurnaloj. Tiu fakto montras, ke ĝi es-



Dr. Lourival Fontes

tas lingvo, kiu treege helpas la diskonigon de in ajn afero".

Pli poste, kiel direktoro de la Departemento de Propaganda kaj Kultura Disvastiĝo, li sendis al la prezidanto de Brazila Ligo Esperantista leteron, el kiu ni elĉerpis la jenon: "Mi profitas la okazon por elmontri al vi miajn plej bonajn dankojn pro la patriota maniero, per kiu laboradas la Brazila Ligo Esperantista, tra la Radio kaj la Internacia Esperanto-Ligo, por pli granda diskonigo de la brazila kulturo kaj de propagando de Brazilo.

Al ĉiuj favoroj, kiujn tiu ĉi Departemento ŝuldas al la Brazila Ligo ĝi nun aldonas nian dankon pro via neprofitema kooperado, disradiante en Esperanto dum la "Horo de Brazilo" la notojn pri politika kaj ekonomia intereso de Brazilo."

Al D-ro Lourival Fontes "O Brasil Esperantista", nome de l' brazila esperantistaro, prezentas korajn gratulojn.

O Exmo. Sr. Dr. Getulio Vargas, presidente da República, por decreto-lei n. 5.077, de 29 de Dezembro último, criou o Departamento de Imprensa e Propaganda em substituição do Departamento de Propaganda e Difusão Cultural.

O novo Departamento compõe-se de cinco Divisões, a saber: de Divulgação, de Rádiodifusão, de Cinema e Teatro, de Turismo e de Imprensa.

Para diretor do novo departamento foi nomeado o Dr. Lourival Fontes, que durante alguns anos dirigiu com grande eficiência o antigo Departamento. O Dr. Lourival Fontes, cujo retrato ilustra o nosso artigo, por mais de uma vez externou sua simpatia pela língua internacional auxiliar Esperanto.

Quando Diretor Geral de Turismo do Distrito Federal, lugar que ocupou anteriormente, assim se externou por ocasião da 36a reunião do Conselho Consultivo da Feira de Amostras do Rio-de-Janeiro: "Está presente à sessão o Sr. Alberto Couto Fernandes, representante da Liga Esperantista Brasileira.

Deseja chamar a atenção de todos aqueles que fazem propaganda do Brasil, quer com fim turístico, quer sob outros aspectos, para que nunca se esqueçam de o fazer em Esperanto. Nesse sentido, pode dar seu testemunho das vantagens que existem.

Por ocasião da exposição de turismo, fez a divulgação em varias línguas, inclusive em Esperanto. Está recebendo, em média, de 15 a 20 cartas, por dia, dos países mais afastados de todas as partes do mundo, comunicando que leram, em Esperanto o noticiário publicado nos jornais.



Esse fato vem mostrar que é uma língua que ajuda enormemente a divulgação de qualquer assunto."

Mais tarde, quando diretor do Departamento de Propaganda e Difusão Cultural, enviou ao presidente da Liga Esperantista um ofício, do qual extraímos os seguintes trechos:

"Aproveito a oportunidade para manifestar-vos os meus melhores agradecimentos pelo modo patriótico com que a Liga Esperantista Brasileira vem trabalhando, através do Rádio e da Liga Esperantista Europeia, para maior divulgação da cultura brasileira e de propaganda do Brasil.

A todos os obséquios que este Departamento deve à Liga Esperantista junto neste momento o nosso reconhecimento pela vossa cooperação desinteressada, irradiando em Esperanto na "Hora do Brasil", as notícias de interesse político e econômico do Brasil".

Ao Dr. Lourival Fontes "O Brasil Esperantista", em nome dos esperantistas brasileiros, apresenta cordeais felicitações.

### 1.º Congresso Brasileiro de Jornalistas Espíritas

Os jornalistas e escritores espíritas do Brasil, reunidos no Rio-de-Janeiro por ocasião da realização do 1.º Congresso Brasileiro de Jornalistas Espíritas:

Tendo em vista os assuntos debatidos nas reuniões do mesmo Congresso e os conceitos constantes da brilhante tese apresentada pelo professor Ismael Gomes Braga; e

Considerando . . . . .

Concluem que os espíritas devem enviar esforços para por o Esperanto a serviço dos altos ideais do Espiritismo e sugerem que os jornalistas e escritores espíritas sejam os primeiros a dar o exemplo de aprender e ensinar o Esperanto em seus grupos e associações, de sorte a formarem, quanto antes o corpo de redatores necessários a uma revista espírita em Esperanto.

Rio-de-Janeiro, 24 de Novembro de 1939.

As conclusões acima foram aprovadas unanimemente.

LA ESTARO DE BRAZILA LIGO ESPERANTISTA PETAS, KE ĈIU GRUPO KAJ IZOLITA ANO ELEKTU SIAN REPRESENTATON ĈE ĜIAJ GENERALAJ KUNSIDOJ.

## PAROLAS LA MAJSTRO

*Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni esperantistoj, devas labori pli energie ol iam.*

(Kongresparolado Genevo 1906.)

## UNUECO DONAS FORTECON.

### Internacia Esperanto-Ligo

*Kongreso 1940.* Ni devas anonci, ke pro la nunaj cirkonstancoj la Kongreso ne povos okazi en Marseille.

*Jarlibro 1940.* Ĉi kune ni sendas Respondilon pri la Jarlibro kaj petas, ke ĉiu Delegito, Vicdelegito kaj Fakdelegito plenu sian ekzempleron kaj gustatempe resendu ĝin al ni. Ĝi estas pli simpla ol tiu por 1939 pro la jena kaŭzo.

La jarlibro por 1940 estas eldonota en du partoj. La unua aperos en Marto, kaj enhavos la Delegitaron kaj la raportojn de I. E. L. La dua parto aperos en Septembro, kaj enhavos la raportojn de la Landaj Asocioj, aliajn propagandajn artikolojn kaj informon pri ŝanĝoj en la Delegitaro.

### BRAZILA POŬTO KAJ ESPERANTO

Kopio de letero ricevita de la prezidanto de "Brazila Liga Esperantista":

*"Ministrejo por Trafiko kaj Publikaj Laboroj — Departamento de Poŝto kaj Telegrafo. — Regiona Direkcio de la Federacia Distrikto.*

Kabineto de la Direktoro, 26-12-39. S-ro ĉ-ro A. Couto Fernandes. — Brazila Ligo Esperantista.

Responde al via letero de la 23a de Novembro lasta mi sciigas vin, ke estis uzataj, ĉe la poŝtagentejoj instalitaj en Palaco Itamaratí, okaze de la 9a Brazila Kongreso de Esperanto kaj de la 2a Sudamerika Konferenco pri Radikomunikoj, la stampoj en Esperanto, kies faksimilojn mi apudmetas.

Tiuj stampoj ne enhavas la vorton "Poŝto", sed ili estis tamen uzitaj ekskluzive de poŝtoficejoj sur ĉiuj korespondadoj afrankitaj en tiuj agentejoj kaj sekve havas oficialan karakteron kaj la stampiloj apartenas al la materialo uzita en la menciitaj agentejoj.

Sen plia, mi subskribas atente  
(sub.) *Libero Oswaldo de Miranda*  
Regiona direktoro

## Propaganda do Brasil no Estrangeiro

O jornal húngaro "Magyar Kereskedem és Pénzügy", que se edita em Budapeŝt, e conta 29 anos de circulação, publicou, em seu número de 24 de Outubro último, uma tradução do artigo "Uma nova indústria brasileira", de autoria do Dr. Democrito Rocha, diretor do jornal "O Povo", de Fortaleza, e publicado na gazeta "O Brasil Esperantista", órgão da Liga Esperantista Brasileira.

O artigo em apreço trata da indústria da Oiticica no Nordeste brasileiro, contendo a parte botânica e o histórico da fabricação do óleo.

O tradutor do artigo para a língua húngara foi o Dr. Tóth Vice, capitão da milícia magyar.

## O ESPERANTO NO CINEMA

Há tempos foi exibido no Rio-de-Janeiro e nos Estados, com o nome de "Este mundo louco", um filme da "Metro-Goldwin-Meier", denominado "Idiot's Delight", que contem cartazes e diálogos em Esperanto, cujos principais papeis foram confiados aos conhecidos astros Clark Gable e Norma Schearer.

Brevemente será exibido um filme da "RKO Radio Pictures, inc.", denominado "Conspiracy", também com cartazes e alguns diálogos em Esperanto.

Vem em terceiro lugar a fábrica "Paramount", que introduziu em seu filme "Road to Singapore" um canto em Esperanto, composto especialmente para esse filme, o qual será cantado pelos célebres astros Bing Crosby e Dorothy Lamour com acompanhamento de 100 vozes.

### Opiniões sobre o Esperanto

"O Esperanto não é a língua que nasceu morta como afirmam uns nem a língua que já morreu como afirmam outros. É a língua que dia a dia se tonifica e se vitaliza no silêncio como as sementes fecundas no fundo da terra.

"A um país como o nosso, servido por um idioma que não é conhecido senão por dois povos, o Esperanto poderá prestar serviços maravilhosos. Poderá espalhar pelos meios cultos a nossa literatura"

VIRIATO CORREIA, membro de la Brazila Beletristika Akademio kaj eksdeputito.

**ESPERANTISTA DEVO: Varbu unu novan esperantiston 1940!**



# BRAZILA INDUSTRIO

## LA BABASUO

La palmo ĝenerale konata laŭ la nomo "Babassú" (Babasuo — *Orbignia Speciosa*) estas naturdevena de Brazilo kaj posedas sian ordinaran *habitat* en ŝtato Maranhão. La unua eksportado de kruda babasuo, en tiu ŝtato, okazis en la jaro 1867, sed la eksportado de ties migdalo datiĝas de 1911. Tiam la babasuo estis aplikata, malgrandskale, al la ekstraktado de oleo, de unu loka firmo, kiu ĝin akiris po 8200 por kg. La ĉefaj produktoj de babasuo estis la altebenaĵoj de Pimheiro kaj la komunumo de Penalva, en la zono de la rivero Pindaré.

La babasuo konsistas el la jenaj elementoj: epikarpo — 11%, mezokarpo — 23%, endokarpo — 57% kaj migdalo — 9%. La epikarpo konsistas el fortikaj fibroj, kiuj formas la mezokarpon. Tiu ĉi entenas fekulhavan substancan, kompaktan, blankviolkoloran, kun forta procento da amelo kaj taniĝo. La endokarpo estas la ujo kiu ĉirkaŭas la migdalon kaj enhavas klorhidrikan acidon, silikon, feron, fosforon, magnezion kaj alkalecajn metalojn. Estas la migdalo kiu produktas industrialtvaloran oleon, kies procento estas 67, 26%.

Post la ekstraktado de la migdala oleo la maso (restaĵo), kiu ankoraŭ enhavas kvanteton da oleo kaj estas nomata "torta" taŭgas por nutrado de la brutaro.

La epikarpo, la mezokarpo kaj la



Bela ekzemplero de la babasuo en Ŝtato Maranhão

endokarpo estas kun granda profito uzataj kiel hejtaĵo. Metodaj studoj por la flegado de la babasua koakso donis la jenan rezulton: 30% da metalurgia koakso, 60% da acetikalcido, 1, 5% da metila alkoholo kaj 80% da gudro. La koakso analizita ĉe la Laboratorio de la Lernejo de Artoj kaj Metioj (Franĉujo) montris 90% da pura karbono.

La varmiga povo de la seka hejtaĵo atingis ĝis 7.770 kalorioj kaj ĝi estas konsiderata bonegkvalita hejtaĵo, ĉar ĝi ne enhavas sulfuron nek arsenikon kaj enhavas minimuman kvanton da fosforo.

Al ĉiu tuno da migdalo respondas 10 tunoj da ŝeloj.

Freŝdataj serĉesploradoj pruvis ke el la babasuo oni povas fabriki eĉ dinamiton kaj izolajojn. La karbo, devenanta de la karbigo de tiu frukto, post necesa "aktivigo" (traktata per mineralaj acidoj, lavata ktp.) estas bonega, kaj havis jam okazon esti aplikita, dum la 1914-1918a milito, en maskoj kontraŭ venenaj gasoj.

La babasuo postulas nenian zorgon pri sia kulturado. La frukto, kiam ĝi maturiĝas, falas teren kaj la homo havas la solan laboron ilin levpreni kaj transporti al la rompejoj por la ekstraktado de la migdalo. La ŝelojn oni lasas en la arbaroj.

La rompo de la frukto estas ankoraŭ farata de la enlandulaj familioj per la rutina procedo de la hakilo.

Bedaŭrinde ankoraŭ ne ekzista rompmaŝinoj, kiuj estas samtempe rezistemaj, facile transporteblaj kaj malkare akireblaj. La plej grava malhelpaĵo al la prospero de tiu multvalora kaj neelĉerpebla riĉaĵfonto estas la manko de transportoj en la zonoj, kie la babasuo havas sian *habitat*.

Laŭ pesimista kalkulo ekzistas en Ŝtato Maranhão pli ol 800 milionoj de tiuj palmoj, kiuj defias la iniciativon de la homoj, kiuj volos inverti sian kapitalon por esplori la ekstraktadon de la oleo, ne parolante pri la aliaj subproduktoj de la babasuo, kiuj estas ankaŭ utilegaj kaj je multoblaj aplikadoj.

Jam ekzistas en la Ŝtato kvar fabrikoj por la ekstraktado de la oleo.

Jen estas la valoro de la eksportado farita de la Ŝtato:

En la unua jaruono de 1939 19.084 mil milrejsoj (ĉirkaŭ 954.200 dolaroj).

En la unua jaruono de 1938 10.949 mil milrejsoj (ĉirkaŭ 547.450 dolaroj).

Ĝi valoras 40% de la ĝenerala eksportado.

(El "O Babassú", pubdikigaĵo de la Registaro de Ŝtato Maranhão, kies regdelegito estas *D-ro Paula Ramos*).

Verkis A. Couto Fernandes

## AŬDI STELOJN

(De *Olavo Bilac*)

"Nu (vi parolos), aŭdi stelojn! Certe La saĝon perdis vi!" mi diros tamen Ke por aŭdi la stelojn mi vekigās, Kaj mi malfermas la fenestron pale...

Kaj ni babilas, dum la lakta vojo, Kiel mantelo malfermita supre, Briletas. Kaj la suno alveninte, Ilin mi serĉas tra l' ĉiel' ankoraŭ.

Vi diros nun: — "Mia freneza frato!" "Kion kun ili vi parolas nokte?" "Kion iliaj frazoj al vi diras?"

Kaj mi diros: — "Por ilin aŭdi, amu! "Ĉar povas havi nur Pamant' orelojn" Kapablajn aŭdi kaj kompreni stelojn."

Tradukis DALTRO SANTOS

(El "Brazilo Esperantista").

Laŭ melodio amata:

## BELA NOKTO

(Barkarolo-melodio de J. Offenbach, el "Rakontoj de Hoffmann")

Bela nokto, paradiza,  
enrevigu nin.  
Pri la tago sobre griza  
forĝesigu nin.

Lumu, steloj, mara rondo  
respegulu vin.  
Songe la murmura ondo  
lulu, lulu nin.

Alportu la zefir'  
karesojn ĉiela-flugile  
Kaj en kisoj mil  
dronu la korsopir'.

De la dioj la envio  
ne desigu nin.  
Donu, nokto, ke nenio  
eldevigu nin. —  
En feliĉego-ebrio  
dronigu nin.

Karl VANSELOW.

(El "Heroldo de Esperanto")



## LA AMERIKAJ GESAMIDEANOJ NE FORLASOS LA ŜIPON

La Prezidanto de la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko, s-ro Joseph R. Scherer, sendis al ni la jenan manuskripton, kiun oni povus nomi manifesto kaj alvoko al la tutmonda samideano, kaj kiun ni tutkore subskribas:

Dum multaj jaroj nia movado vojaĝis kiel bela marŝipo sur trankvilaj akvoj. La pasaĝeroj kaj oficiroj sur la verda "Ŝipo Esperanto" parolis plej diversajn naciajn lingvojn kaj devenis el cento da landoj; ili havis haŭtojn plej diverskolorajn kaj preĝis laŭ religioj ĉiuspecaj. Tamen ili komprenis unu la alian facile dank' al komuna neŭtrala lingvo. Spite de okazaj internaj militetoj, la Verda Familio daŭrigis sian vojaĝadon sur la "Maro de Indiferenteco". La granda publiko ne plu donis al ni opozicion. Ĉar ne plu estis ondoj, multaj ŝipoficiroj kaj pasaĝeroj ekdormis. Okaze ŝajnis ke oni eĉ ne kapitano devis esti ŝanĝata.

Subite la "Ŝipo Esperanto" sin trovas en milita uragano. Kelkaj oficiroj kaj multaj pasaĝeroj devis forlasi la laboron por paco kaj devis iri en armeojn por malpaco. Jen, oficiroj kiuj neniam serioze gvidis, kaj pasaĝeroj kiuj neniam aktive laboris (eĉ ne en kluboj), devas transpreni taskojn por savi nian movadon. Multaj "mempensiitaj pioniroj" devis kaj ankoraŭ devos reveni al aktiva laboro.

Ankaŭ amerikaj gesamideanoj vojaĝadis delonge sur la "Ŝipo Esperanto". Feliĉe ili ne devas iri al militaj frontoj kiel devis la gesamideanoj de la militantaj kaj eĉ de neŭtralaj landoj. La amerikaj gesamideanoj komprenas ke ili havas sanktan devon.

Ju pli teruros la milito en Eŭropo, des pli urĝe estos ke la gesamideanoj de Pan-Ameriko restu fidelaj. Anstataŭ nun forlasi la internacian movadon, ili libervole sin oferos por servi sur la "Ŝipo Esperanto", se ne gvidante, tiam almenaŭ per aktiva varbado en siaj respektivaj urboj por gajni financon subtenon, en formo de membrokotizoj por IEL.

Se nia "Ŝipo Esperanto" pereus, la perdo estus terura. Multaj jaroj pasus, ĝis kiam ni povus konstrui novan internacian organizon, per kiu Esperanto povus denove eknagi sur la internacia "Maro de Indiferenteco". Landaj asocioj kaj distriktaj federacioj estas nur malfortaj savboatoj, per kiuj ni ne povas grandskale varbi kaj progresi.

Do mi petas la gesamideanojn de la tuta mondo: Ne forlasu la ŝipon! Eĉ se

## BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

Balancete referente ao ano de 1939

Saldo de 1938 . . . . .	22.200	
Subvenção recebida do Ministério da Educação, referente ao ano de 1938 . . . . .	2:997.000	
Quótas de sócios . . . . .	3:052.900	
Venda de livros e percentagens . . . . .	240.000	
Caixa de garantia . . . . .	109.000	
Assinaturas, exemplares avulsos e anúncios . . . . .	53.300	
Traduções para o Esperanto feitas pela Liga . . . . .	390.000	
Impressão de "O Brasil Esperantista" e outras impressões . . . . .	2:829.600	
Impressões da brochura "Exercícios de Esperanto" . . . . .	500.000	
Importância paga à "Internacia Esperanto-Ligo" por quótas de sócios . . . . .	1:933.900	
Aquisição de livros . . . . .	77.200	
Assinaturas de jornais estrangeiros . . . . .	183.400	
Adesão ao Congresso Universal . . . . .	100.000	
Material de expediente . . . . .	15.200	
Limpeza da máquina de escrever . . . . .	55.000	
Aquisição de molduras . . . . .	46.000	
Anulação de lançamentos feitos por antecipação em 1938 (1) . . . . .	591.900	
Vencimentos . . . . .	960.000	
Selos do Correio, estampilhas, telegramas e despesas miudas . . . . .	616.430	
<b>Saldo para 1940</b> . . . . .	<b>139.570</b>	
		Rs. . . . . 7:456.300   7:456.300

Rio de Janeiro, 31 de Janeiro de 1940.

(Assinado — Odilo Pinto)

Tesoureiro

Visto. (Assinado — A. Couto Fernandes)

Presidente

(1) Sendo, Impressões — 411\$900 e Vencimento — 180\$000.

la plej terura uragano klopodos forviŝi vin en la maron de indiferentuloj, ne forlasu la internacian organizon IEL... nek la aliajn internaciajn aŭ fakajn federaciojn, al kiuj vi apartenas! Eĉ se vi en la plej teruraj ne havus sufiĉe da mono por aĉeti manĝaĵojn, restu fidelaj kaj sendu viajn kotizojn, kaj legu kaj subtenu aktive la internaciajn Esperantajn gazetojn, ĉar sen ili nia ŝipo naĝus en uragano sen lumo, kaj sen telefona sistemo... kaj rapide pereus la "Ŝipo Esperanto".

La amerikaj gesamideanoj ne forlasos la ŝipon. Miaj klopodoj kiel prezidanto de EANA estos uzataj ne nur por la nacia progreso sed ankaŭ por zorgi ke la usonaj gesamideanoj restos fidelaj al la granda "Ŝipo Esperanto", ĉar mi konscias ke usona nacia asocio estas malgranda ŝipeto simila al savboato. Amaso da naciaj asocioj sen granda internacia IEL similus al grupo da savboatoj sen internacia granda marŝipo. Kaj leginte revuojn de la naciaj en la cetera Ameriko, mi scias ke

la sama kuraĝa persistemo kaj fideleco por la internacia movado vivas ankaŭ en la koroj de niaj pli sudaj kaj pli nordaj gesamideanoj.

Nova sensacia sukceso de Esperanto en Hollywood estas bonvena kiel luma radio tra nigraj nuboj. La granda Paramount Studio estas la tria filmfarejo de Hollywood kiu uzas Esperanton — ĉifoje en nova, speciale verkita bela kanto en la filmo "Vojo al Singapuro". Ĝi estas la unua grandfilmo, en kiu aŭdiĝas esperantlingva kanto. Pri tio legu en aparta artikolo.

Dume ne forlasu la ŝipon!

(El "Heroldo de Esperanto")

Nur du lingvojn lernu tuj,  
Kaj ne pensu pri la tria:  
Estu unu de l' Patruj',  
De l' homar' estu l' alia!

I. G. B.



## Katolikismo kaj Esperanto

Lia Eminenco, Kardinalo D. Dougherty, Ĉefepiskopo de Filadelfio, en Usono, restis en Rio-de-Janeiro du semanojn kiel honora gasto de la brazila Registaro, kaj tiam ricevis multajn oficialajn kaj privatajn honorigojn.

La 20an de Februaro, ĝuste je la antaŭtago de lia forveturo al Usono, la katolika Societo "Radio Vera Kruco" organizis programon, kiu daŭris 45 minutojn, por honorigi Lian Eminencan Moston, kiu ĝin aŭdis ĉe la Usona Ambasadorejo.

Parolis en latina lingvo Pastro Elpidio Cotias, direktoro de la Societo, en angla lingvo s-ino Stela Faro, prezidantino de la "Asocio de Brazilaj Sinjorinoj", ing. Adhemar Jobim, eksdirektoro teknika de la Societo, kaj d-ro Ildefonso Albano, direktoro ĉe la Ministrejo por Terkulturo, kaj en Esperanto ing. A. Couto Fernandes, membro de la Agado Katolika kaj gvidanto de la kurso de Esperanto disrardiata de la stacio de *Radio Vera Kruco*. Tiu ĉi citis la vortojn de Zamenhof ĉe la solena malfermo de la Sesa Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Washington, en 1906a.

Fermis la programon d-ro Placido de Mello, prez. kaj ĉeffondinto de *Radio Vera Kruco*, kiu parolis en portugala lingvo.

La sekvintan tagon, ĉe la forveturo de Lia Kardinala Moŝto, s-ro Couto Fernandes ricevis komplimentojn de tre gravaj katolikoj, el kiuj ni citas la nomojn de Lia Eminenca Moŝto D. Sebastião Leme, brazila kardinalo kaj Ĉefepiskopo de Rio-de-Janeiro, Lia Episkopa Moŝto D. Benedito de Souza, kiu tiam diris la jenajn vortojn: "Samideano, vi parolis tre bone"; Monsinjoroj Benedito Marinho kaj Felício Magaldi, kiuj, kiel la antaŭa, paroladis por Esperanto dum mesoj faritaj okaze de Brazilaj Kongresoj de Esperanto.

## O Esperanto no Exército francês

O Ministério da Guerra da França expediu há pouco tempo a seguinte circular: "O Ministro da Guerra faz saber que o Sr. Pierre Delaire, diretor do Escritório do Esperanto, à rua de Patay, 63, em Orléans (Loiret), está autorizado a organizar cursos de Esperanto para os militares arregimentados.

"Esses cursos serão facultativos e gratuitos. Terão lugar fora das horas

## MONUMENTO AL KRISTO

RIO-DE-JANEIRO



La bildo montras la grandiozan statuon de Kristo Savinto, starantan sur la pinto de la fama monto Corcovado (Korkovado), kiu estas alta 711 metrojn.

La statuo estas alta 30 metrojn sur pedestal alta 8 metrojn, en kies interno estas konstruata belega kapelo por ĉiama adorado, kiu povas enteni ĉirkaŭ 100 personojn.

La distanco de la ekstremaĵo de unu mano au tiu de la alia estas 28metra. La tuta monumento, kiu estas farita el subferigita cemento kaj kovrita per mozaiko el trianguloj de brazila ŝtono (steatita), konata kiel "sapo-ŝtono", pezas du milionojn da kilogramoj.

Ĝi estas belega monumento de fido, scienco kaj arto. Nokte ĝi estas brilege lumigata per potencaj reflektoroj kaj prezentas neimageblan aspekton.

La supreniron al la supro de Corcovado oni faras per elektra dentrada fervojo aŭ per aŭtomobilo sur moderna ŝoseo, lukse pavimita.

de serviço e não deverão motivar nenhuma despesa para o orçamento da Guerra. As aulas funcionarão fora dos edifícios militares.

"Nas guarnições desprovidas de professores competentes poderão ser organizados cursos por correspondência. Maiores detalhes poderão ser solicitados do Sr. Delaire".

## Statistiko kaj Esperanto

La Instituto de Geografio kaj Statistiko ĵus oferis al kelkaj ŝtataj instruistinoj perfektigan kurson, konsistantan el paroladoj pri Geografio, Popolsumigo kaj Statistiko. Okaze de tiu ĉi parolado, kiu finis la kurson, d-ro Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la Instituto, diris kelkajn vortojn pri la celoj de la Instituto. Tiam li reliefigis la neprokrasteblan neceson de internacia lingvo, kies problemoj jam estas solvita de Esperanto. Li deklaris, ke unu el la celoj de la Instituto estas la disvastigo de Esperanto, kiun ĝi alprenis kiel sian helplingvon. Li rememorigis, ke la Instituto publikigis "Statistikan Resumeton" nur en Esperanto, kies dua eldono rilata al la jaro 1938 baldaŭ aperos. D-ro Teixeira de Freitas, pro liaj valoraj servoj faritaj al la kreiĵo de Zamenhof, meritas la laŭdojn kaj dankojn de la tuta esperantistaro.

## Progressos do Esperanto

A nova edição do horário oficial para os automóveis do correio nos Alpes Suíços contém as explicações e informações também na língua Esperanto.

— O observatório astronômico "Sonnenborgh", de Utrecht, na Holanda, usa o Esperanto em sua correspondência. Os impressos do observatório destinados ao uso internacional contém textos em cinco línguas, a saber holandês, inglês, francês, alemão e Esperanto.

— A gazeta "Existenz", órgão do "Clube dos inventores", da Boêmia-Morávia, publica seus artigos em Esperanto, afirmando de que deles tenham conhecimento os inventores estrangeiros.

— A Sociedade da Cruz Vermelha Húngara comunicou à Federação Esperantista Húngara ter aceite oficialmente o Esperanto em sua correspondência internacional, tendo para isso recebido autorização do Ministério da Guerra. Assim todas as cartas que lhe forem dirigidas em Esperanto serão respondidas nesse idioma auxiliar.

Toda correspondência deve ser dirigida à: Sociedade da Cruz Vermelha — Barossutca 15, Budapest. Hungria.

— A "Ente Provinciale per il Turismo", com sede em Turim, na Itália, publicou um lindo prospeto ilustrado dessa cidade com o texto exclusivamente em Esperanto.

— Sob o título "BUDAPEST — a Rainha do Danúbio" publicou o Departamento de Turismo um sugestivo prospeto contendo belas ilustrações e detalhadas informações sobre a capital da Hungria redigidas somente em Esperanto.



## NOTOJ EL MIA KAJERO...

O participio chamado "passado", em português, dá origem a enganos muito frequentes, quando vertido para o Esperanto. É curioso ver-se, p. ex.: "*Li estis sidITA*" ou "*La festo estis jam komenciĝITA*" etc. A questão é, porém, fácil, requerendo tão somente atenção para duas regras claras.

"Sidi", p. ex., é verbo intransitivo, e, em consequência, *não tem voz passiva*; todos os verbos desta categoria só podem ser empregados na voz *ativa*. Assim: "Ele estava sentado" se dirá ou simplesmente: "*Li sidis*" (porque "*sidi*" = estar sentado), ou: "*Li estis sidANTA*". Exclamar-se-á: "*sidanta*" no presente? Por certo: o presente naquela ocasião. É bom recordar que as terminações dos participios, em Esperanto, indicam ações ou estados ocorrentes em relação ao momento indicado pelo auxiliar "*estis*"; isto, dum modo geral, já se vê.

A segunda regra se refere a verbos terminados em *IGI*, que, por sua própria natureza, não admitem voz *passiva* — justamente como os primeiros. A segunda frase se verterá, portanto: "*La festo estis jam komenciĝINTA*". Note-se o *pretérito* do verbo principal, o que explica ação já *passada* naquele momento a que nos referimos.

Enumeremos ainda alguns verbos da primeira categoria, todos no participio: montado, chegado, nascido, parecido, posto (postado), caído, deitado, situado, precisado (em necessidade), acontecido, viajado, arrependido, compadecido etc.

Assim:

"Meu primo é aquele *montado*, no cavalo branco = *mia kuzo estas tiu (oficiro) rajdANTA la blankan ĉevalon*"

"É *chegada* a hora = *estas venINTA la horo*".

É homem muito *vijado* = *li estas homo multe vojaĝINTA*".

"Não estou *precisado* de dinheiro, mas de saúde = *mi ne estas bezonANTA monon, sed sanon*".

"Encontrei um guarda *postado* na esquina = *mi renkontis gardiston starANTAN ĉe la stratangulo*".

"Ele passou *deitado* nos braços de dois amigos = *li preterpasis kuŝANTE sur la brakoj de du amikoj*".

"*Compadecido* do velho, ela lhe deu uma moeda = *kompatANTE la maljunulon, ŝi donis al li moneron*". (Nota: "*kompati*" é realmente *transitivo*).

E assim por diante.

Outros verbos da segunda categoria, além de "*komenciĝi*": levantado, acabado, nascido, extinto, afastado, empa-

## NEKROLOGO



GENERALO D-ro J. M. MOREIRA  
GUIMARAES

La 10an de Februaro lasta Atropo, la kruela Parco, tranĉis la fadenon de la vivo de valorega homo. Tiam teruran baton suferis la koro de la brazila esperantistaro. Mortis, je la aĝo de 75 jaroj, la eminenta generalo d-ro J. M. Moreira Guimarães, prezidanto kaj honora prezidanto de "Brazila Klubo Esperanto", fondita en la jaro 1906. Al li tiu ĉi klubo kaj "Brazila Ligo Esperantista" ŝuldas sian gastadon en la sidejo de la "Societo de Geografio

livedido (pálido), corado, sentido (agastado), humilhado, passado, perdido, transviado, casado, etc. Exemplos:

"Eu já estava *levantado* = *mi estis jam levigINTA*".

"Está *acabada* a festa = *estas finiĝINTA la festo*".

"Ele está *afastado* do nosso meio = *li estas forigINTA de nia rondo*".

"Perdoemos os corações *humilhados* = *ni pardonu la humiliĝINTAJN korojn*".

"Isso foi *passado* em minha ausência = *tio estas fariĝINTA dum mia forresto*".

"O sol já era *nascido* = *la suno estis jam naskiĝINTA*".

Encontrei-o *perdido* = *mi trovis lin perdiĝINTA*".

"*Empalidecido* de cólera, etc... = *paliĝINTE de kolero, li...*

"Aquele casa fora o refúgio dos

de Rio-de-Janeiro", kies prezidantecon li okupis ĝis sia morto.

Milita inĝeniero, diplomito pri fizikaj kaj naturaj sciencoj, kaj filozofia doktoro multajn servojn li faris al sia kara patrujo. Kiel militisto, li ricevis gravajn komisionojn, kiujn li brilege plenumis. Li komandis la Militan Lernejon, servis en Eŭropo kaj en Japanujo, tie ĉi kiel milita adjudanto dum la rus-japana milito. El tio ĉi rezultis la apero de interesa libro pri Japanujo.

Li estis federacia deputito, membro de la "Historia kaj Geografia Instituto", profesoro ĉe la Fakultato de Filozofio, membro de la Centra Komitato de la Internacia Pozitivista Societo, Prezidanto de la Societo de Geografio de Rio-de-Janeiro, korespondanta ano de la Geografia Societo de Lisbono, de Tokio kaj de diversaj Stataj Geografiaj Institutoj kaj Granda Majstro de la Brazila Framasono.

Flua ĵurnalisto kaj oratoro, poeto, fama verkisto, scientisto, granda patrioto kaj, precipe, orkorulo, li havis grandan rondon de amikoj kaj admirantoj.

Brazila Ligo Esperantista, en la nomo de la brazila esperantistaro, oferis verdblankan girlandon kaj ĝiaj estraranoj akompanis lin al lia lasta loĝejo.

Al lia kara edzino, s-ino Elza Guimarães, niajn korajn kondolencojn!

*transviados* = *tiu domo estis iam la rifuĝejo de la elvojiĝINTOJ*".

"Ele ainda não está *casado* = *li ankoraŭ ne estas edziĝINTA*".

Há, como se vê, casos em que se emprega a forma *adverbial*, outros a forma *substantiva* etc.; isto, contudo, seria outro capítulo...

É fato que algumas das frases acima poderiam ter outra feição. Assim: "É chegada a hora = chegou a hora = *alvenis la horo*". Também: "Isso foi passado = isso passou-se = *tio fariĝis* = isso foi ocorrido = *tio estas okazINTA* = isso ocorreu = *tio okazis*". Com essas mudanças, entretanto, se perde a força de expressão, e muito mais em Esperanto do que no português. Onde, porém, a diferença? Leia-se, leia-se muito... mas de lapis em punho. Para este artigo por exemplo, nada mais fizemos senão aproveitar notas do nosso caderninho...



# BRAZILA KRONIKO

**AMAZONAS. Manaus.** — “União Portuguesa” publikigis artikolon titolitan “Esperanto en la lernejo”. Kelkajn tagojn poste aperis, sub la sama titolo, letero de s-ro Sebastião Augusto al s-ro Passos Gomes, kiu reliefigas la rezolucion de la Instituto de Geografio kaj Statistiko. “Diário da Tarde” aperigis notojn sub la rubriko “Esperanta Kroniko”.

**Benjamin Constant. Boca do Javari.** — Enskribigis en la “Kurso per korespondado” kaj aliĝis al BLE kiel M.J. s-ro José Casemiro Botelho, publika instruisto.

**CEARÁ. Fortaleza.** — Filiigis al B. L. E. la Katolika Esperantista Klubo”, konsistanta el lernantinoj de d-ro Democrito Rocha. Novan fotografadon de ĝiaj aninoj ni publikigas en la nuna numero. Aliĝis al niaj Ligoj kiel M.J. s-ro João de Deus Cavalcante. Forveturis suden, ĝue de siaj ferioj, f-ino Maria Stela Sidou. Ŝtata instruistino kaj lernantino de d-ro Democrito Rocha ĉe la Instituto Lourenço Filho. Dum sia restado en Rio-de-Janeiro ŝi vizitis la prezidanton de B. L. E.

“O Povo”, kiu faras viglan propagandon por Esperanto, sciigis sian legantaron, ke la hungara ĵurnalo “Magyar Kereskedelem és Pénzügy”, kiu estas eldonata en Budapeŝto, publikigis tradukon de la tuta artikolo de d-ro Democrito Rocha pri la “Ojtjicko”, aperinta en “O Brasil Esperantista”. En “O Povo” ankaŭ aperis hungara

rakonto tradukita el Esperanto, kies titolo estas “La tri krimuloj”.

Alia numero de “O Povo” enhavas artikolon pri vizito farita de d-ro Democrito Rocha al la “Cercle of English Conversation”, kie li aŭdis paroladon de s-ro Luiz Furtado pri Esperanto. Post la parolado d-ro D. Rocha dankis en Esperanto la afablan saluton al li faritan.

Malfermiĝis nova kurso por intelektuloj sub la gvido de d-ro D. Rocha.

**RIO GRANDE DO NORTE. Mossoró.** — Forveturis al Fortaleza, kie li intencas restadi kelkajn monatojn, nia tiea delegito s-ro Targino Soares. Jen lia provizora adreso: Rua da Assunção, 587. Fortaleza, Ceará.

**PERNAMBUCO. Recife.** — Aperis la 5a numero de “Pernambuco Esperantista”, okpaĝa, kun la portreto de Zamenhof kaj fotografado de la geanoj de Grupo Esperantista “Ismael Gomes Braga”, el Garanhuns. En la ĉefartikolo, kiu enhavas la titolon “80a naskiĝa datreveno de nia majstro”, oni reproduktas la vortojn de Zamenhof pri la “Fundamento de Esperanto”. Ĝi enhavas poeziojn de Melo Souza kaj Matos Quinaud kaj diversajn artikolojn, el kiuj ni citas la jenajn: “Hieraaŭ, hodiaŭ”, de Leonora Stirling; “Esperanto modelo”, sub la gvido de Ismael Braga, kaj “La amerikaj honoraj gardistoj zorgos ke nia kandelo ne estingiĝu”, de s-ro J. Scherer, prezidanto de Nordamerika Esperanto-Asocio.

Al s-ro Odilon Vidal de Araujo, redaktoro de tiu gazeto, s-roj Couto Fernandes kaj Carlos Domingues sendis laŭdan telegramon.

Novaj geanoj de “Pernambuco Esperanta Asocio” aliĝis al BLE/IEL, kiel M.J., nome: f-inoj Elza Vidal de Araujo kaj Besilda Vidal de Araujo kaj s-roj Eugenio de Mendonça Paes Barreto, Antônio Jacome de Araujo kaj Jaaziel de Souza Campos.

Revenis al Salvador, ĉefurbo de Ŝtato Baía, kie ŝi loĝas, f-ino Leonora Stirling, propagandistino de la religio de “Bahai”.

**Garanhuns.** — Fariĝis tiea delegitino f-ino Maria do Socorro Monteiro, prezidantino de la loka grupo. La revuo “O Bibliófilo” publikigis la jenajn artikolojn de f-ino Carmosina Monteiro: “Esprimplena venko”, “Ĉefverko de logiko kaj simpleco”, “Naciismo kaj Esperanto” kaj “Esperanto ĉe kinematografio”. La gazeto “Paládio” aperigis artikolon de f-ino Maria do Carmo Monteiro kaj “A voz do Instituto”, oficiala organo de la Profesia Instituto, artikolon de f-ino Alice Aragão Sobrinho. La ĉiutaga gazeto “Garanhuns Diário” publikigis sur la unua paĝo interesan artikolon pri Esperanto.

**Catende.** — La gazeto “Correio de Catende” publikigis artikolon de s-ro Ubirael Silva Barbosa titolitan “Português e Esperanto”.

**ALAGOAS. Sant’Ana do Ipanema.** — Post kelksemajna restado en Recife kaj Salvador revenis la tiea delegito d-ro Arsenio Moreira da Silva.

**BAÍA. Alagoinhas.** — Je la 29a de Decembro lasta okazis ĉe la “Kolegio 10 de Junio” ekzameno de dek-unu ĝeneracioj de la kurso de Esperanto, kiun tie direktis la malnova esperantisto s-ro Carlos de Souza Cunha, delegito de IEL. La ekzamena komitato konsistis el la jenaj personoj: Instruistino Anta Castro, direktorino de la lernejo, kiu prezidis la ekzamenojn, instruistino Zita Tavares kaj s-ro Carlos Cunha, kiel reprezentanto de BLE. Ĉiuj estis aprobitaj kaj ricevis la “Ateston pri Lerno”. Jen iliaj nomoj, laŭ la klasiga vico: Instruisto Antonio Lins, el la Normala Lernejo; studento Lourival Cunha, J. Torres Filho, Lucio Bento Cardoso, instruistino Eurydice Barros, Maria de Castro Cunha, José Marcelino Silva, Salomão Barros, ĉefdirektoro de la gazeto “O Popular”; Ana Hendryce Barros, Lucy Cunha kaj Victorio Rocha Pitta. Ĉestis la ekzamenojn s-ro Severiano Sodré, ĉefredaktoro de “O Popular”.

## ESPERANTO EN STATO CEARÁ



D-ro Democrito Rocha, delegito de IEL en Fortaleza kaj direktoro de la gazeto “O Povo”, kaj liaj lernantinoj, aninoj de la “Katolika Esperantista Klubo”, kiu ĵus filiigis al B.L.E. Jen iliaj nomoj: Starantaj — Maria Luiza Sidou, Maria de Jesus Andrade, Neusa Nepomuceno, Angelita Saboia Campos, Zeneida Porto kaj Lucia Rocha. Sidantaj — Antonieta Vidal, Maria de Lourdes Cunha, Bia Evangelista, Guiomar Aquino kaj Stael Porto. Adreso de la klubo: Rua Benfca, 2.457. Fortaleza



Niajn korajn gratulojn al s-ro Carlos Cunha pro la bela rezulto de liaj laboroj.

*Chique-chique.* — S-ro Ismael Braga ricevis leteron skribitan en Esperanto, per kiu s-ro Geraldo Ribeiro de Araujo, oficisto ĉe la loka urbestro, dankis, en la nomo de la urbestro, la librojn, kiujn s-ro Braga donacis al la Komunuma Biblioteko. S-ro Geraldo diligente lernas la internacian lingvon, kiun li propagandos.

SÃO PAULO. *São Paulo.* — En la monato Januaro okazis ĝenerala kunveno de "S. Paulo Esperanta Klubo" por balotado de nova estraro, kiu konsistas nun el la jenaj personoj: Prez. — d-ro Geraldo de Azevedo, vicprez. — s-ro Mario G. Rodrigues Monteiro, ĝenerala sek. — s-ro Osvaldo Leite de Morais, kas. — s-ro Abraão Sarraf. Regule funkcias la kurso de Esperanto kaj baldaŭ malfermiĝos alia. Dum sia restado en tiu ĉefurbo vizitis la sidejon de la Klubo s-ro Josefo Joels, ano de BLE kaj aŭtoro de la ĵus aperinta "Kompleta Vortaro Esperanta-Portugala". La Klubo ricevis ankaŭ la viziton de la germana esperantisto s-ro Josef Cahn, kiu vojaĝas al Catalão.

Aliĝis al BLE/IEL s-roj Fernando Leite de Morais, kiu ankaŭ fariĝis fakdelegito por Turismo. Abraão Sarraf kaj Armando Cambiaghi.

La prezidanto de SPEK ricevis de la estraro de "Rádio Piratininga" — PRH-3, kiu baldaŭ inaŭguros sian stacion, inviton, por ke la klubo organizu ĉiutagan duonhoran programon pri Esperanto. Oni decidis, ke dum tiu Esperanta horduono okazos kurso sub la gvidado de s-ro Mario Rodrigues. Ĉiuj lokaj ĵurnaloj aperigis notojn pri tiuj okazintaĵoj.

*Itararé.* — La estraro de SPEK ricevis leteron subskribitan de aro da lernemuloj, kiuj deziras fondi en tiu urbo Esperantistan grupon. Al ili s-ro Morais tuj sendis la necesajn informojn kaj BLE kelkajn esperantaĵojn adresitajn al s-ro Adail Ary da Silva — Hotel Avenida.

RIO GRANDE DO SUL. *Vila S. Sebastião.* — Artikoloj en kaj pri Esperanto aperis en la spiritista revuo "A Senda".

MINAS GERAIS. *Belo Horizonte.* — Dum sia libertempa vojaĝo s-ro Ismael Gomes Braga vizitis la ĉefurbon kaj aliajn urbojn de la vasta ŝtato Minas Gerais. En Belo Horizonte li faris vizitojn al kelkaj esperantistoj, kiuj ilin repagis. Inter ili estas s-ro Wilson Veado, tiea delegito de IEL, kaj Ing. Faria Alvim, kiu kelkajn tagojn poste malfermis kurson de Espe-

ranto. Ĉe la "União Espirita Mineira" s-ro Ismael faris paroladon pri la helplingvo, post kiu s-ro prof. Cúcio Pereira, ĝia prezidanto, proponis la fondon de lernejo aŭ societo por la propagando de Esperanto. La propono estis tuj akceptita kaj oni fondis esperantistan societon nomatan "Humberto de Campos".

S-ro Ismael verkis dekon da artikoloj por la lokaj ĵurnaloj kaj, en unu el la plej gravaj li metis ĉiaman anoncon pri siaj libroj. La nova gazeto "Síntese", organo de la "União da Juventude Espirita", aperigis artikolon de s-ro Guerreiro da Paz titolitan "La granda Espero".

— S-ro Claudovino de Carvalho Junior daŭrigas sian propagandon de Esperanto ĉe la Kolegio Batista. Li intencas baldaŭ fari paroladetojn en aliaj medioj.

*Ubá.* — En tiu ĉi urbo loĝas tri fratoj de s-ro Ismael Braga. Unu el ili, s-ro José Gomes Braga, estas delonge ano de BLE kaj tiea delegito de IEL. En lia hejmo s-ro Ismael aŭdis unu el la lecionoj disradiitaj de "Radio Vera Cruz", en Rio-de-Janeiro. Skribante al la prez. de BLE li diris: "La Espero tonĉris fortege, arogante, impone en la salono". Li faris du paroladojn pri Esperanto en la Spiritista Grupo "Ismael" kaj unu en la salono de "Cinema Brasil". Tiu ĉi faris grandan bruon, ĉar ĝi okazis sub la patronado de la urbestro, s-ro Levindo Ozanam Coelho. La temo de la parolado estis neŭtrala — Esperanto kiel kondukilo de kulturo —, tamen ĝia celo estis mencii la progresojn de Esperanto ĉe la tutmondaj katolikaj rondoj. Prezidis la kunvenon d-ro José Cavalière, kiel reprezentanto de la urbestro, kaj prezentis la oratoron s-ro José Sollero, eminenta katolika instruisto kaj verkisto. La loĝantaron oni invitis per flugfolioj kaj per la gazetoj "Cidade de Ubá", "Jornal do Povo" kaj "Gazeta do Povo".

*Araguari.* — Aliĝis al BLE/IEL la jenaj estraranoj de la loka Grupo Esperantista: S-roj Alvaro Teixeira, Patrocínio Valverde de Morais, Antonio Severino Coelho, Alfeu de Medeiros kaj Otilio Naves. Jen la adreso de la grupo — Caixa postal 73. Araguari. E. F. Mogiana. Minas Gerais.

GOIAZ. *Catalão.* — Aliĝis al BLE/IEL d-ro José Vitor Rodrigues, kiu elektis la kategorion MAH. Dankon!

MATO GROSSO. *Cuiabá.* — La gazeto "O Estado de Mato Grosso" publikigis artikolon pri Filatelio verkitan de nia malnova samideano d-ro Benjamin Camozato, prezidanto de "Sud-brazila Esperantistigilo", el Porto Ale-

gre, kiu restis kelkajn semajnojn en la ĉefurbo de ŝtato Mato Grosso. El tiu artikolo rezultis, ke la gazeto parolis pri d-ro Camozato kiel esperantisto kaj tiamaniere faris propagandon pri Esperanto.

RIO-DE-JANEIRO. — Aliĝis al "Brazila Klubo Esperanto" kaj sekve al BLE/IEL s-ro Ayrison Dionysio Alves kaj realiĝis al ili s-ro ing. Anibal Pinto de Souza. Tiu ĉi, kiu aliĝis kiel aktiva membro, intencas fariĝi fakdelegito por "Geologio".

S-ro Ismael Braga akceptis la funkcion de "Direktoro de la propagando de Esperanto" ĉe la *Brazila Spiritista Federacio*.

Post la ĉiujara ferio rekomenciĝis la kursoj de Esperanto ĉe la "Instituto de Geografio kaj Statistiko", "Societo de Geografio" kaj en la sidejo de "Societo Esperantista Konkordo". Dum la monatoj Januaro kaj Februaro funkciis la perradiaj kursoj disradiitaj de la stacioj de "Rádio Transmissora" kaj "Rádio Vera Cruz". Ĉiusabate okazis kunvenoj de la estraranoj de BLE.

"Jornal do Comércio", "A Vanguarda" kaj aliaj ĵurnaloj aperigis notojn pri Esperanto. La januara numero de "Reformador" publikigis diversajn artikolojn de Ismael Braga kaj aliaj kaj anoncojn pri la libroj por la lernado de la helplingvo. Ankaŭ "Revista Espirita do Brasil" aperigis artikolon pri la "Unua Brazila Kongreso de Spiritistaj Ĵurnalistoj" kaj la poresperanta rezolucio tiam aprobita.

## Turismo en Italujo

MODERNA LUMA INDIKILO POR LA TURISTOJ EN TRIESTE

En Trieste baldaŭ ekfunkcios tute moderna luma indikilo, kiu lokita en centra punkto de la urbo, permesos al la turistoj tuj ekkoni la pozicion de la diversaj rendevuejoj, muzeoj, fervoja kaj mara stacidomoj, publikaj oficejoj k. t. ĵ.

La originala indikilo, ampleksanta proksimume 18 kvadratajn metrojn, prezentos la planon de la urbo. Flanke de la plano troviĝas klavo por ĉiu konstruaĵo (stacidomo, muzeo, publika oficejo, ktp.): preman-te la klavon de la konstruaĵo, kiun oni devas viziti, ĝi tuj lumiĝos tiel, ke la turisto povos facile atingi ĝin laŭirante la straton, kiun li preferas.

SENPAĜA KORESPONDO-SERVO POR ĜESKOLTOJ KAJ ALIAJ GEJUNULOJ

"Estu Preta", nova Esperanta instru-gazeto por usonanoj, deziras adresojn de eksterlandaj junuloj por sia korespondoservo. La nura kondiĉo estas frua respondo al ricevita korespondado. Ni prizorgos, por ke oni ne ricevu pli ol la deziratan nombron da komunikadoj. Sendu klare skribitajn adresojn al: "Estu Preta", WINCHESTER, Illinois, Usono. Poŝtkarto sufiĉos.



# Turismo Kaj Propagando

## BRAZILIO

	Jaro	Kvanto
BRAZILIO — Parolado farita de Prof. d-ro Everardo Backheuser ĉe la Geografia Societo de Parizo, eldonita de Hachette & Comp. . . . . .	1907	2.000
Bolteno Memoriga pri la Nacia Ekspozicio kun titoloj en la lingvoj portugala, franca kaj Esperanto . . . . .	1908	2.000
Autaŭparolo de l' Bolteno supra, en Esperanto, eldonita de la Direktejo Ĝenerala de Statistiko . . . . .	"	1.000
La defendo de l' Kaŭĉuko en Brazilo dekretita de l' Ministerio de Agrikulturo (aperinta en "Brazilia Esperantisto")	1912	800
Revuo de la Societo de Geografio de Rio-de-Janeiro kun esperanta resumo de la artikoloj (Ĝis hodiaŭ) . . . . .	1933	1.000
Prospekto de "Touring Club do Brasil", ilustrita, en kelkaj naciaj lingvoj kaj Esperanto . . . . .	"	5.000
Serio de 20 ilustritaj poŝtkartoj kun teksto en portugala lingvo kaj Esperanto eldonitaj de la Departemento de Poŝto kaj Telegrafo . . . . .	"	30.000
Serio de 39 ilustritaj poŝtkartoj kun teksto en portugala lingvo kaj Esperanto, eldonitaj de la sama Departemento	"	40.000
Prospekto ilustrita en Esperanto pri la 7a Internacia Specimena Foiro de Rio-de-Janeiro . . . . .	"	2.000
Stampo kun la vorto "Turisma urbo" ĉe la Poŝta Agentejo Rio Branco, en Rio-de-Janeiro. (Ĝis hodiaŭ) . . . . .	"	—
Stampo kun vortoj en Esperanto ĉe la Poŝta Agentejo funkciinta en la Specimenfoirejo . . . . .	"	—
Stando de Esperanto ĉe la "Montro de Turismo" organizita de la Urbeŝtraro de Rio-de-Janeiro . . . . .	1935	—
Turismo kaj Esperanto — Parolado farita de la Prez. de B. L. E. ĉe la ejo de la "Montro de Turismo" kaj disradiita ĉien . . . . .	"	1.000
Inaŭguro de la semajna disradiado en Esperanto ĉe la "Horo de Brazilo", kiun direktas la Departemento de Propagando kaj Kultura Disvastiĝo (La disradiado daŭris du jarojn) . . . . .	"	—
Poŝtmarko memoriga de la Internacia Specimenfoiro kun vortoj en portugala lingvo kaj Esperanto . . . . .	"	300.000
Afiŝo pri la 8a Int. Specimenfoiro kun vortoj nur en Esperanto . . . . .	"	1.000
Kataloglibro pri la 8a Int. Specimenfoiro en kelkaj naciaj lingvoj kaj Esperanto . . . . .	"	5.000
Stando de Esperanto ĉe la 8a Int. Specimenfoirejo . . . . .	"	—
Gvidlibro pri Rio-de-Janeiro nur en Esperanto, kun multaj ilustraĵoj. Eldonita de la Ministrejo por Eksterlandaj Aferoj kaj presita ĉe la Ŝtata Presejo . . . . .	1936	3.000
Oficialaj Kartleteroj kun vidaĵoj de Rio-de-Janeiro kaj frazoj en kelkaj naciaj lingvoj kaj Esperanto (du eldonoj)	"	60.000
Poŝtmarko memoriga de la 9a Int. Specimenfoiro kun vortoj en portugala lingvo kaj Esperanto . . . . .	"	300.000
Kataloglibro pri la 9a Int. Specimenfoiro en kelkaj naciaj lingvoj kaj Esperanto . . . . .	"	2.000
Afiŝo en Esperanto pri tiu Foiro . . . . .	"	1.000
Poŝtmarko memoriga de la 9a Brazilia Kongreso de Esperanto (oficiala) . . . . .	"	500.000
Poŝtmarko memoriga de la Jubilea Kongreso de Esperanto eldonita, kiel la antaŭaj, de la Departemento de Poŝto	1937	500.000
Ilustrita prospekto nur en Esperanto pri la 10a Int. Specimena Foiro de Rio-de-Janeiro . . . . .	"	3.000
Kataloglibro pri la 10a Int. Specimenfoiro de Rio-de-Janeiro kun teksto en kelkaj naclingvoj kaj en Esperanto . . . . .	"	1.000

## POŝTO KAJ ESPERANTO

Elbeuf, la 16<sup>an</sup> de Decembro 1939

Altestimata Sinjoro Couto FERNANDES.

BRAZILA LIGO ESPERANTISTA. Praça da Republica, 54 — RIO DE JANEIRO  
Brésil.

Tre estimata Samideano,

La 3an de Decembro, en Rouen, ĉe la Filatelia Asocio, mi faris prelegon pri "Poŝtmarkoj kaj kovestoj kun Esperanto-teksto". Mi prezentis amasegon da tiaj oficialaj poŝtaĵoj; la sukceso estis granda. Kompreneble, la ĉeestantaro tre miris — ĉar ĝi tion ne sciis — ke Esperanto estis jam tiel ofte uzita kaj nun ankoraŭ uzata. Post kelkaj monatoj, mi daŭtigos la temon, prelegante pri "Esperantaj poŝtstampoj"; mi povos montri kelkajn maloftajn pecojn, kiuj elkonvinkigos la ĉeestantojn. Certe, la plena kolekto da brazilaj stampoj havos sukceson.

Samtage, kiel presajo, mi sendas al vi donace la libron: "NORDA KANTO". Akceptu ĝin, kiel modestan dankajeton de via Elbeuf'a kolego. Tiel oftege vi faris al mi grandan plezuron per sendo de dokumentoj, ke mi volas esprimi iel mian dankon.

Ĉiuj dokumentoj de vi senditaj tre helpis al mi por la propagando. Mi opinias, ke propagando de Esperanto sur praktika tereno estas necesega; tial mi interesigas pri uzado de nia lingvo en Poŝtaj Rondo, en Komercaj Folioj, en Turismo, ktp, ktp.

Je tiu vidpunkto, niaj Brazilaj amikoj estas imitindaj kaj gratulindaj.

Kvankam estas milito en Francujo, la Esperanto-movado vivas; ĉiuj hejmerestintaj esperantistoj klopodas por konservi "vivantaj" la kutiman agadon. Mi, malnova kaj maljuna esperantisto, mi volas, ke kiam paco regos denove sur Eŭropo, la militintaj samideanoj, retrovu la movadon freŝa, vigla kaj aktiva, kiel antaŭe.

Respekte kaj altestime salutas

G. SAGET, kemiisto-direktoro,

4, Rue Saint-Jacques, ELBEUF

(Seine-Inf.) — Francujo.

## Kinematografarto kaj Esperanto

La estraro de BLE ricevis de la famaj geartistoj Dorothy Lamour, Bing Crosby kaj Bob Taylor leteron skribitan en korekta Esperanto, per kiu ili sciigas la brazilan esperantistaron, ke baldaŭ oni povos aŭdi kanton de ili kantitan en Esperanto ĉe la filmo "Vojjo al Singapuro", kiun ĵus preparis la tre konata filmfabrikejo PARAMOUNT.

Ĝi estas la tria, kiu uzis Esperanton, sed estas la unua, en kiu oni kantas en la internacia lingvo.

Niajn korajn dankojn kaj salutojn al la direktoro de la filmejo kaj al la ĝentilaj geartistoj.



GIMNASTIKO KAJ ESPERANTO



La bildo montras la faman "Kaskadeton", en la belega Kvartalo "Tijuca". Vidigas grupo de geanoj de la "Asocio de Radĝimnastikuloj", konsistanta el gefernantoj de la gimnastika kurso de Prof. Oswaldo Diniz Magalhães, ĉiutage disradiata de la "Radio Nacional". En la grupo estas Prof. Magalhães kaj kelkaj gekursanoj de Esperanto

EL ESTONUJO

Ekster Eŭropo, feliĉe, la kondiĉoj por la disvastigando de nia ideo estas pli favoraj, precipe en Brazilo, kie lastatempe estas notebblaj diversaj sukcesoj.

(El "Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio". Novembro — Decembro 1939.)

Gazetas Esperantistas Estrangeiras

Durante os meses de Novembro, Dezembro e Janeiro últimos, a-pesar-da guerra, recebemos as seguintes gazetas e revistas esperantistas: Heroldo de Esperanto, Amerika Esperantisto, Arbeiter-Esperantisten, da *Noruega*; Argentina Esperantisto, Belga Esperantisto, The British Esperantist, Dansk Esperanto-Blad, Esperanto, L' Esperanto, Esperanto Internacia, Franca Esperantisto, Frateco, da *Bulgária*; Helena Esperantisto, Informoj, da *Estônia*; Laborista Esperantisto, da *Holanda*; Militrezistanto, da *Inglatera*; La Praktiko, da *Holanda*; La Revuo Orienta, do *Japão*; Scienca Gazeto, dos *Estados Unidos*; La Suda Stelo, da *Iugoslavia*; Svenska Esperanto-Tidningen, La Granda Familio, da *Holanda*; Bulteno de Internacia Scienca Asocio Esperantista, da *França*; Estu preta, dos *Estados Unidos*; La Vojo, da *Holanda*; Voĉo el Oriento kaj Heroldo de Ĉinio, *China*; Laborista Esperantisto, da *Suécia*; Ni vokas vin, da *Suiça*.

NAŪA BRAZILA KONGRESO DE GEOGRAFIO

7-16 de Septembro 1940

Florianópolis - Santa Catarina - Brasil

Honora prezidanto: D-ro Getulio Vargas, prez. de la Respubliko.

Aliĝa kotizo ..... 25\$000

Sendu vian kotizon al la "Presidente da Comissão Organizadora do IX Congresso Brasileiro de Geografia — Praça da República, 54, Rio-de-Janeiro.

Ni memorigas ke kvin el la antaŭaj kongresoj aprobis rezoluciojn favorajn al Esperanto.

**SPECIALA PREZO POR LA GRUPOJ**

FILIJATAJ AL B. L. E.

10 Kolektoj (Gramática elemental de Esperanto, Vocabulário Esperanto-Português, Exercícios).

50\$000

	Jaro	Kvanto
Afiŝo en Esperanto pri tiu Foiro .....	"	3.000
"Statistika Resumeto" eldonita de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko (nur en Esperanto) .....	1938	3.000
Bulteno pri la Internacia Filatelie Ekspozicio "Brapex". Du volumoj kun teksto en la ĉefaj naciaj lingvoj kaj Esperanto .....	"	5.000
Faksimiloj de la du lastaj memorigaj poŝtmarkoj kun teksto en Esperanto sur la posta kovrilo de la jenaj libroj eldonitaj de Ismael Gomes Braga: "Esperanto sem mestre", "Essência e futuro da idéia de língua internacional", "Metodo de Esperanto" e "Esperanto - Livros e discos".	"	16.000
Bildo kun la titolo "Brazila Poŝto kaj Esperanto", sur luksa papero .....	"	2.000
Bildo kun fotografaĵoj pri la Stando de Esperanto, ĉe la "Internacia Filatelie Ekspozicio "BRAPEX", okazinta en Rio-de-Janeiro, sur luksa papero .....	"	1.000
Poŝtkartoj en Esperanto de propagando de "BRAPEX" ..	"	3.000
Dukolora stampo kun vortoj en Esperanto kaj la VERDA STELO uzita de la Poŝta Agentejo ĉe la "BRAPEX" ..	"	—
Stampo kun vortoj en Esperanto de propagando de la "Unua Juneca Ekspozicio Filatelie", okazinta en Belo Horizonte, ĉefurbo de ŝtato Minas Gerais, uzita de la Poŝtagentejo tie instalita .....	1939	—
Kataloglibro pri la 12a Int. Specimenfoiro de Rio-de-Janeiro kun teksto en kelkaj naĝlingvoj kaj en Esperanto ....	"	3.000
Stampo kun vortoj en Esperanto uzita de la Poŝtagentejo instalita en la loko de la 12a Int. Specimenfoiro .....	"	—
"Brazila Revuo de Geografio", trimonata revuo eldonata de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko" kun resumo en Esperanto de ĉiuj artikoloj .....	"	5.000
"Praktika procedo por la kalkulado de la aorta diametro...", kvarfolia verketo de d-ro A. Lins. Recife .....	"	1.000
"Statistika Resumeto", rilata al la jaro 1938, eldono de la supra Instituto. (En preparo) .....	1940	—



# ENIGMO

## KORESPONDADO

En trapacifika aviadilo deĵoras tri viroj nome: Smith, Jones kaj Robinson, kies profesioj, sed en alia vico, estas direktlisto, subdirektlisto kaj komisaro. En la sama aerŝipo vojaĝas tri pasaĝeroj, nome: S-roj Smith, Jones kaj Robinson.

- Sciinte ke: a) S-ro Robinson loĝas en Novjorko;  
 b) La subdirektlisto loĝas inter Novjorko kaj S. Francisco;  
 c) S-ro Jones gajnas 6.000 dolarojn jare;  
 d) Smith venkas la komisaron je bilardo;  
 e) La plej proksima najbaro de la subdirektlisto, nome, unu el la tri pasaĝeroj, gajnas la trioblon de lia salajro, tio estas, trifoje 3.300 dolaroj;  
 f) La pasaĝero, kies nomo estas egala al tiu de la subdirektlisto loĝas en S. Francisco;

oni demandas: Kiu estas la nomoj de la direktlisto, la subdirektlisto kaj la komisaro?

Sendu vian solvon ĝis la 30-a de Aprilo al: Brazila Ligo Esperantista — Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro. Al la 3 unuaj solvintoj s-ro Mario G. Rodrigues kaj B. L. E. donacos libro-premiojn.

## DA EUROPA

### CARTAS ABERTAS

A ERICO COELHO —  
 Ao chegar assim às margens do famoso lago, em que o velho Rousseau vive ainda no bronze em poética ilha, que lhe foi consagrada, tivemos a grande surpresa de abraçar um desses beneméritos que, à própria custa, movido apenas pelas suas convicções, se abalancara em uma longa viagem a vir representar o Brasil no Congresso Universal de Esperanto ou no "Universala Kongreso de Esperanto", como se escreve na nova língua, sucessora do "volapük". Era Medeiros e Albuquerque.

O certo, todavia, é que a reunião do 2.º Congresso de Esperanto desta vez aqui a Genebra mais de dois mil adeptos novíssima língua. E, pelos hotéis, onde achavam aboletados os delegados ofiçosos das diferentes nações, o entusiasmo era tal, que não resistimos à curiosidade de assistir à sessão inaugural de tão seleta quão numerosa assembléia.

Os esperantistas, na verdade, constituem hoje uma verdadeira seita. Teem o seu hino e a sua bandeira. O seu distintivo e a sua imprensa. Em todos os hotéis de Genebra ou de "Genovo", como eles dizem, o seu pavilhão verde-branco se desfraldava, tendo ao canto, sobre um fundo branco, uma estrela ainda verde. A mesma estrela, marginada de ouro, também lhes servia de símbolo na lapela das sobrecasacas, em que, em pleno verão suíço, afrontavam de longe os favores do nosso Clube Médico.

Poucas vezes, entretanto, temos assistido a uma festa tão imponente e interessante como a sessão solene com que os delegados esperantistas de dezete nações diferentes comemoraram a sua segunda reunião em congresso, para darem conta dos progressos da sua propaganda em todo o mundo civilizado.

O Victoria Hall, uma das mais belas salas de espetáculos de Genebra, regor-

gitava de espectadores, entre os quais se destacavam inúmeras senhoras, entusiásticas cultoras do Esperanto, a ponto de não consentirem, umas com as outras, nas mesas dos hotéis, que usassem de outra linguagem que não a consagrada pelo novo idioma universal. Algumas dessas gentis esperantistas faziam mesmo parte das comissões especiaes do congresso: e mostravam até maior facilidade do que o sexo forte em se exprimirem nessa mistura curiosa de todas as línguas faladas atualmente na Europa e na América.

Foi isso, pelo menos, o que colhi em um rápido exame sobre os diversos espécimens de bibliografia esperantista, com os quais fui presenteado à porta do Victoria Hall.

A-pesar-da grande maioria dos adeptos desse idioma do futuro ser talvez de origem anglo-saxônica, aproxima-se ele muito mais das línguas latinas, especialmente o português, o espanhol e o italiano.

Efetivamente, por mais que se tenha procurado ridicularizar essa velha aspiração de ligar ainda mais a humanidade sob o nosso planeta em um ideal comum de liberdade, de amor e de justiça, fazendo com que todos se possam entender por uma mesma língua e o pensamento só tenha uma imagem gráfica em todas as consciências, forçoso é reconhecer-se que essa idéia tem conquistado terreno, saindo já das divagações abstratas dos filósofos e dos publicistas para a propagan-

La gelnantoj de S-ro Mario G. Rodrigues — Rua General Glicerio, 357. Santo André. Estado de São Paulo. — deziras korespondadi kun brazilaj kaj eksterlandaj esperantistoj.

Korespondadon kun sudamerikaj gamsamideoj deziras sveda gravuristo, esperantisto de la jaro 1931. Certe respondos. AXEL ANDERSON. NY-FORSGATAN 26. ESKIBSTUNA. SVEDUJO.

da prática pelo ensino e pela constituição de centros de atividade, capazes de a impulsionarem assiduamente em todos os países civilizados.

O recente congresso de Genebra é uma prova eloquente desta verdade. Sem a representação oficial, nem o auxílio indireto dos governos, tantos homens ilustres não emprenderiam fatigantes e custosas viagens, se não os movesse a convicção sincera de que estão mesmo trabalhando com proveito para a grande obra da confraternização universal.

Paris — 1906

Dunshee de Abranches.

Dunshee de Abranches, tre konata ĵurnalistoj kaj verkistoj kaj eksdeputito, subskribis la peton senditan de Brazila Ligo Esperantista al La Ligo de Nacioj pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj prezentis al la Deputitara Ĉambro proponon pri ĵara subvencio al B. L. E.



Bloko kun 10 pecoj de la poŝtmarko memoriga de la Internacia Filatelio Ekspozicio "BRAPEX", okazinta en Rio-de-Janeiro en 1938

Prezo: Unu dolaro aŭ 15 respondkuponoj.

Mendu ĝin al: Brazila Ligo Esperantista. Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro. — Brasil —

**Dicionário Completo Esperanto-Português**  
 DE  
**JOSEFO JOELS**  
 com prefácio de *Ismael Braga*  
 Um volume com 280 páginas  
 Preço:  
 brochura . . . . 5\$000  
 encadernado . . . 7\$000  
 Livraria Editora da Federação  
 Av. Passos, 30 — Rio-de-Janeiro



**BRAZILA LIGO ESPERANTISTA  
e Internacia Esperanto-Ligo**

**QUOTA ANUAL  
1940**

	socio isolado	socio de grupo filiado
AM (membro simples) . . . . .	15\$000	10\$000
MJ (recebe o "Jarlibro") . . . . .	25\$000	20\$000
MA (recebe o "Jarlibro" e a gazeta mensal "Esperanto Internacia") . . . . .	50\$000	45\$000
MAH (recebe o "Jarlibro" e o semanário "Heroldo de Esperanto") . . . . .	80\$000	75\$000
MAH recebendo tambem "E. I." . . . . .	92\$500	87\$500

Todos recebem gratuitamente "O Brasil Esperantista".

Nos lugares em que existir grupo esperantista filiado, a adesão à Liga deve ser feita de preferência por intermedio dèle.

Para que um grupo esperantista se filie à Liga basta que pague a importância correspondentemente às quotas de três sócios de qualquer categoria. Assim um grupo pode ser filiado à Liga pagando, no mínimo, a quota anual de 30\$000.

De acordo com seus Estatutos, todos os sócios do BRAZILA KLUBO "ESPERANTO" são sócios da Liga Esperantista Brasileira e da Internacia Esperanto-Ligo.

Todo sócio MJ, MA, ou MAH pode ser delegado da I. E. L. sem acréscimo de pagamento.

Assinatura anual de "Heroldo de Esperanto" . . . . .	50\$000
" " " "Esperanto Internacia" . . . . .	25\$000

**Grupoj Aligintaj al B. L. E.**

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO" (1906). Sidejo: Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro.

SUSBRAZILA ESPERANTISTIGILO. (1927). Sidejo: Rua dos Andradas, 1431. Porto Alegre, Rio Grande do Sul.

CENTRO ESPERANTISTA DE SANTOS. (1932). Sidejo: Rua Baía, 57. Santos. Est. São Paulo.

GRUPO ESPERANTISTA DE MONTE APRAZIVEL. (1935). Sidejo: Monte Aprazivel. Est. S. Paulo.

ESPERANTA GRUPO DE BAÍA. (1936). Sidejo: Rua Bangala, 18. Salvador. Baía.

S. PAULO ESPERANTA KLUBO. (1937). Sidejo: Rua B. Vista, 15-4.ª and. sala 11/12. São Paulo.

PERNAMBUKA ESPERANTO-ASSOCIACIO. (1937). Sidejo: Rua do Principe, 398. Recife. Pernambuco.

ESPERANTO - KLUBO DE SANTO AMARO. (1937). Sidejo: Av. Viana Bandeira, 10. Santo Amaro. Baía.

ESPERANTISTA GRUPO "ISMAEL GOMES BRAGA". (1938). Sidejo: Praça D. Moura, 334. Garanhuns, Pernambuco.

SOCIETO ESPERANTISTA "KONKORDO" (1939). Sidejo: Praça 11 de Junho, 49. Rio-de-Janeiro.

GRUPO ESPERANTISTA DE ARAGUARI. (1939). Adreso: Caixa postal 73. Araguari. Minas Gerais.

KATOLIKA ESPERANTISTINA KLUBO. (1939). Sidejo: Rua Benficia, 2457. Fortaleza. Ceará.

**KIA PLEZURO VOJAGI AL FERIOJ**



**KUN PROVIZO DA M. LIBROJ**

Libroj por la triono de la vendoprezoj kutimaj. Skribu al:

LITERATURA MUNDO  
Bleier Vilmos

1, rua Brey — PARIS XVII — França

**"ESPERANTO SEM MESTRE" COM DISCOS DE PRONÚNCIA**

Contra remessa de 40\$000, a Liga Esperantista Brasileira envia em registrado postal, para qualquer ponto do Brasil, um album com seis discos de pronúncia modelo e o manual "Esperanto sem mestre", de Ismael Gomes Braga, no qual se encontram os textos de exercicios gravados nos discos.

Para estudar ou para ensinar, os discos são utilísimos.

Encomendas á Liga Esperantista Brasileira — Praça da República, 54-1.º. Rio-de-Janeiro

**"O Brasil Esperantista" petas al la estraroj de l' brazilaj kluboj kaj al la brazilaj delegitoj de I. E. L., ke ili sendu monatan raporton pri siaj propagandaj kaj instruaj laboroj**

**REVISTA BRASILEIRA DE GEOGRAFIA**

(Brazila Geografia Revuo)

Trimonata publikigaĵo kun resumo en Esperanto de la ĉefaj artikoloj. Eldonita de la Nacia Instituto de Geografio, fako de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko.

Jam aperis kvar numeroj.

Ĉiu numero: 6\$000 aŭ 5 poŝtaj respondkuponoj.

Jarabono: Unu dolaro kaj duono aŭ 20 poŝtaj respondkuponoj

**Adreso: Avenida Augusto Severo, 4**

**RIO DE JANEIRO, BRASIL**

**ANONCOJ**

Paĝo . . . . .	100\$000	5 dolaroj
Paĝduono . . . . .	60\$000	3 "
Paĝkvarono . . . . .	40\$000	2 "
Paĝokono . . . . .	30\$000	1 dolaro

Anonceto (du linioj) — 3 poŝtajn respondkuponojn.